Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
**MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro**


# Festivala Kuriero

**09-a de aŭgusto 2020, numero 11**
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La unua Virtuala Kongreso de Esperanto fermiĝis, sed MondaFest' daŭriĝas


**Obstine antaŭen! La nepoj vin benos***

* La vojo. L.L. Zamenhof










## Humphrey Tonkin: Honora Prezidanto de UEA




En la unua kunsido de la Ĝenerala Kunveno 2020 de la Komitato de UEA, kiu unuafoje en la historio okazis rete kiel parto de la Virtuala Kongreso de Esperanto, la Komitato elektis Humphrey Tonkin kiel Honoran Prezidanton de UEA.

Li estas meritoplena ano de la Honora Patrona Komitato de UEA, jam de 1995. La lastaj 25 jaroj elokvente kaj multrilate konfirmis lian elstaran rolon en la historio de la Asocio.

Legu pri tio en la Gazetara Komuniko de UEA n-ro 897: https://uea.org/gk/897a1

## Zlatko Tišljar iĝis Honora Membro de UEA



Dum sia unua reta kunsido kadre de la Virtuala Kongreso la Komitato de UEA elektis Zlatko Tišljar kiel Honoran Membron.

Legu pri tio en la Gazetara Komuniko de UEA n-ro 898: https://uea.org/gk/898a1

# La Virtuala Kongreso de Esperanto 2020 de UEA vere surprizis min pro sia bona organizado, flueco kaj agrabla etoso!

Alex Cesário

La organizantoj kaj la respondeculoj pri *Retevent* brile sukcesis kontraŭstari miajn unuajn impresojn kaj kritikojn, precipe ĉar ili evitis la antaŭregistritajn prelegojn (kiuj abundis en VEKI) kaj multe uzis Jitsi kaj eĉ Zoom dum la kongreso, ebligante al ĉiuj aktivan partoprenadon ene de la samtempaj prelegoj, kiuj estis riĉigitaj per kleraj demandoj kaj babiladoj ene de la programeroj mem. Alia grava decido estis la aldono de la programeroj "Babilu kun...", kiu ankaŭ multe allogis ĉiujn aliĝintojn.




La kongreso fakte estis bonega, en ĝi la kongresa etoso estis simila al de la ĉeestaj ordinaj kongresoj kaj certe la sistemo *Retevent* kaj ĝia skipo estas unu el la plej gravaj kialoj, kiuj favoris al ĝia sukceso.


Mi pardonpetas al niaj karaj samideanoj Fernando Maia Jr kaj Peter Baláž se, iamaniere, mia antaŭa afiŝo (*en la fejsbuka grupo de UEA – Red.*) ĉagrenigis ilin. Fakte, mia nura intenco estis veki atenton favore al pli bona kaj sukcesa evento.

Mi profitas ĉi tiun afiŝon por gratuli kaj danki al ĉiuj estraranoj de UEA, al la organizintoj kaj prelegantoj, al la skipo de *Retevent* kaj ĉefe al Fernando Maia Jr kaj al Peter Peter Baláž pro iliaj senlaca laboro kaj sindediĉo, kiuj estis gravegaj por tiu grava, sukcesa kaj emociiga virtuala kongreso!

Espereble la venontaj UK de UEA estos organizitaj kiel mikso inter la ordinaraj ĉeestaj kaj tiaj nunaj virtualaj kongresoj por ebligi al ĉiujn, kiuj ne povas partoreni pro ajnaj kialoj al la ĉeestaj kongresoj.

# Partoprenu la Internacian Literaturan Konkurson Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020 ĝis la 30-a de septembro!

Malfermita la 22-an de aprilo, la Internacia Literatura Konkurso Ĥristo Gorov – Ĥrima 2020, organizata de Bulgara Esperanto-Asocio, bonvenigas rakontojn kaj eseojn de geesperantistoj el ĉiuj landoj. Ĥristo Gorov (Ĥrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, talenta Esperanto-verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto.



Aŭtoroj rajtas partopreni per unu rakonto aŭ po unu eseo, originale verkita en Esperanto. La konkurso ne havas konkretan temon. La verkoj estu tajpitaj komputile kaj ĉiu aŭtoro nepre uzu la Esperantan alfabeton per supersignoj. La aŭtoroj indiku sian sekson. La verkoj estu subskribitaj per la vera nomo de la aŭtoro, estu plena poŝtadreso, telefonnumero kaj interretadreso. La rakontoj kaj eseoj estu maksimume 3-paĝaj; formato A4; tiparo *Times New Roman* (12 punktoj). La gajnintoj ricevos valorajn premiojn. Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 30-a de septembro 2020 rete al modest@abv.bg aŭ poŝte al Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Vrabnica" 1, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.

El: https://eventaservo.org/e/fab008

Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# 14 elstaraj agantoj diplomitaj dum la Virtuala Kongreso de Esperanto



En la Solena Fermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto estis anoncitaj la nomoj de la 14 ricevantoj de la Diplomoj 2020 pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007.

### Elstara Agado:

**Aleksandr Korĵenkov kaj Halina Gorecka (Rusio)** pro elstara agado kiel redaktoroj de la *Ondo de Esperanto* kaj kiel eldonistoj ĉe Eldonejo *Sezono*j, kiu ekde 1983 jam publikigis vere eminentajn verkojn por Esperantujo;

**Lee Jung-kee (Koreio)** pro longtempa elstara agado kiel motoro de la Seula Esperanto-Centro, julie kun 337-a kurso el 2-monataj lernadoj, ekde 1991;

**Rakoen Maertens (Belgio)** pro elstara agado kiel reprezentanto de TEJO kaj UEA ĉe UN kaj Unesko; inter alie dum la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo kaj en la Junulara Forumo de UN-Ekosok;

**John Magessa (Tanzanio)** pro elstara agado pri restarigo de la movado en Tanzanio;

**Jean-Pierre Marcq kaj Evelyne Rotellini (Francio)** pro elstara agado per la asocio Esperanto plus, kiu finance subtenas afrikajn aktivulojn kaj pro kreo de la NOMAD-kurso;

**Yves Nevelsteen (Belgio)** pro elstara kunlaborado en pluraj retaj agadoj (Eventa Servo, Vikipedio, Komputeko), starigo de la fonduso Instigo-Liberapay, Esperanto-traduko de retejoj kaj programoj kaj aliaj projektoj, kiel Eksterrete kaj kolekto de markoj en Esperanto;

**Fernando Ŝajani (Brazilo)** pro elstara agado kiel fondinto de la retejo Eventa Servo;

**Bert Schuman (Francio)** pro longtempa elstara agado kiel organizanto de la Internacia Infana Kongreso kaj motoro de la Esperanto-Kulturdomo en Greziljono.

### Elstara Arta Agado:


**Pascal Dubourg Glatigny (Germanio)** pro la elstara kontribuo al la literatura Esperanto-kulturo inter alie per la projekto Militrakontoj;

**Kjara (Chiara Raggi) (Italio)** kantverkisto, aŭtoro, gitaristo kaj komponisto, pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo, inter alie per sia koncerto, kiu fermis la virtualan 52-an Malferman Tagon, kaj pro sia regula reta prezentado dum la socia izoliĝo;

**Ale Kosabela (Argentino/Brazilo)** pro la elstara kontribuo al la muzika Esperanto-kulturo per sia vasta Esperanto-muzika produktado, pro la talenta kunlaboro kun pluraj esperantistaj artistoj, kaj pro la lanĉo de La Pordo;

**István Nemere (Hungario)** pro la elstara kontribuo al la Esperanto-literaturo, kiel unu el plej produktemaj verkistoj.

# Afriko dum la VK



Adjévi Adjé

*Verdaj plumoj el Afriko* kaj *Afriko komunikas* estis du programeroj, kiujn mi prezentis la 8-an de aŭgusto 2020, la lastan tagon de la Virtuala Kongreso de UEA. La unua temo disvolviĝis kiel interbabilado en vidbabilejo de VK, sed la dua estis formala aranĝo de la Afrika Komisiono de UEA pri la nuntempaj kaj venontaj Esperanto-movadoj en la kontinento. Ĝi prezentis oficialajn informojn el Afriko inter kiuj la plano por la UK 2024 en Afriko.

Por ambaŭ programeroj, mi uzis lumbildojn kaj volonte respondis demandojn de spektantoj. Ĉeestis ankaŭ kolegoj de la Afrika Komisiono, de ĝiaj konsilantaro kaj aliaj afrikaj aktivuloj. Ĉiu laŭbontrove riĉigis la kunvenon en la vidbalibejo per komentoj. Dankon al ĉiuj, kiuj per sia ĉeesto subtenis nin kaj Afrikon.

# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope



«Ĉu longa vojo?»: debato pri Paco, fundamenta kolono de UN




Scienca Kafejo: La Kanada Odiseado, Lando Bazita sur Nekompletaj Konkeroj



Scienca Kafejo: La Valoroj de Esperanto en Ŝanĝiĝanta Mondo (John Huang)



Internacia Kongresa Universitato: Romianoj kaj persoj en la malfrua antikvo: milito, arto kaj kulturo




Klerige: Kvizo Muziko el la tuta mondo



UN 75-jara: Esperanto kaj Unesko



Aŭtora Momento kun Normand Fleury kaj Zdravka Metz: «Besta Verbaro» kaj «Bestoj en nia korto – Birdoj en nia domo»



Eduka valoro de Esperanto en diversaj niveloj de instruado